

Leterkesto V.

Radioprelego de Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI, SRI 1990-004-B-1, 1990.02.10

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI. Kadre de nia rubriko 'leterkesto' ni havas ankoraŭ multajn korespondaĵojn de geaŭskultantoj, kiuj skribis al nia redakcio dum la jaro 1989. Do, ni daŭrigu prezenti ilin.

A.- Ĝojige estas, ke la esperanto-sono trafas pli kaj pli novajn kampojn. Tion konfirmas letero de sinjoro Manuel Francisco FONTES el la Respubliko de Kaboverde. Antaŭ nelonge tie oni aŭdis nin kaj intencas krei esperanto-kurson por la preparado de estonta esperanto-grupo en tiu lando. Por la propagando sinjoro FONTES deziras koni la nombron de la esperantistoj ekzistantaj tutmonde, ekscii pri la lando, kie Esperanto estas plej multe parolata; informiĝi pri literaturaĵoj kaj gazetoj eldonitaj en esperantujo. Sinjoro FONTES ŝatus ricevi librojn kaj revuojn por varbi novajn esperantistojn. Tiucele ni anoncas lian adreson kaj instigas vin helpi al la fervora propagandisto de nia afero: Lia adreso do estas: sinjoro Manuel FONTES, Vila da Igrja-Mosteiros, Ilha do Fogo, Respubliko de Kaboverde. Mi ripetas la adreson: ...

Cl.- Sinjoro Mario ORTEGO el Bogota en Kolombio aŭskultis la prelegon pri elektraj veturiloj, kiuj nuntempe funkcias en Svislando. Li ŝatus pli da informoj pri tiu temo en esperanto, sed seeble ankaŭ hispanlingve kaj anglalingve.

A.- Por Danilo Oviedo QUESADA en Kostariko ni estas kelkfoje la nuraj esperantaj voĉoj dum multaj semajnoj aŭ eĉ monatoj. Sinjoro QUESADA loĝas en limurbo inter Panamo kaj Kostariko kaj la plej proksimaj esperantistoj loĝas en la ĉefurbo.

Cl.- Ankaŭ el Kubo skribis al ni esperantistoj, kaj ni atendas iliajn pliajn informojn pri la Universala Kongreso, kiu en la jaro 1990 okazos en Kubo.

A.- LITERATURA FOIRO, la kultura revuo en esperanto fondita de la literatura rondo 'La Patrolo' inaŭguris per la numero 117 en februaro 1989 sian dudekan jarkolekton. La esperanto-redakcio de Svisa Radio Internacia kore gratulas okaze de tiu jubileo kaj deziras ankaŭ por la estonteco ĉion bonan al la kreantoj de tiu grava esperanto-periodaĵo.

Cl.- Inter la landoj, kie oni kaptas niajn elsendojn, troviĝas ankaŭ Madagaskaro kaj Meksikio. De tie oni raportas, ke la klareco de la voĉoj estas preskaŭ bona. Do, ni estas dankemaj, se oni regule skribos al ni por povi kontroli la kvaliton de la teknika realiĝo de la disaŭdigoj.

A.- Feliĉe viaj elsendoj ne okazas nokte, sed almenaŭ posttagmeze, skribis al ni certe ne sen ironio sinjoro Ru BOSSONG el Eindhoven en Nederlando.

Inter la regulaj korespondantoj troviĝas sinjoro Joop VAN DER HOEVEN el Nederlando. Liaj leteroj estas tre interesaj, ĉar aŭskultante niajn elsendojn, li verkas komenton kaj sendas ĝin al ni. Tial ni estas certaj, ke oni ne nur aŭskultas, sed ankaŭ ion pensas. Svisaj temoj ĉiam frapas. Kiam ni prelegis pri la varvenda koncerno nomata 'Migros', aperis la nocio 'sociala kapitalismo'. Tiu termino estis io tute nova por sinjoro VAN DER HOEVEN. Li supozas, ke homo kapitalista, kiu faras kooperativon el sia entrepreno, devus esti nomata 'konvertito' aŭ 'prozelito'. Kvankam ni ne tute malkovris la sencon de viaj proponitaj vortoj, ni aliflanke povas aldoni, ke sinjoro Gottlieb Dutweiler, kiu fondis la kooperativon Migros, estis homo, kiu engaĝiĝis ne pro propra riĉeco, sed por la bonvolo de la kooperativo. Estas

interese, ke Migros hodiaŭ estas unu el la plej riĉaj entreprenoj en Svislando. Sed ĝi estas entrepreno, en kiu unuopaj homoj ne povis fariĝi kapitalistaj riĉuloj. La dungitoj ricevas salajron observante la ekvilibritan evoluon de la kooperativo. Sociala ĝi estas krome ankaŭ pro tio, ke ĝi malpermesas la vendon de alkoholo kaj fumaĵoj, kaj ankoraŭ hodiaŭ ĝiaj varoj estas multe malpli kostaj ol la samaj produktoj en specialaj vendejoj. Sinjoro VAN DER HOEVEN plene apogas la esprimon 'supermerkato', kiu laŭ li estas formo de progreso, racieco kaj efikeco. Certe, en la diskuto pri supermerkatoj oni devus aldoni la argumenton, ke malaperis la intima etoso interhoma, kiu regis en la malgrandaj butikoj. La supermerkatoj pli kaj pli voris ilin. Tamen, grandaj avantaĝoj de tiuj grandvendejoj estas ne nur, ke la prezoj estas pli moderaj, sed ankaŭ la higieno kaj freŝeco de la varoj, kaj krome oni ŝparas tempon povante aĉeti ĉion dezirantan en unu loko.

Cl.- Alia temo, kiun aludas sinjoro VAN DER HOEVEN, estas la turismaj kaj sportaj ebloj en Svislando, kiuj estas ŝatataj de multaj eksterlandanoj. Ĉar en Nederlando vivas multaj nacioj, sinjoro VAN DER HOEVEN aŭdis kun intereso la prelegon pri la dulingveco ĉe infanoj. Li iom klarigis tiun tre aktualan temon en Nederlando.

A.- Aludante al la intervjuo kun bulgara samideano ĉe nia radio pri la internacia esperanto-kursejo en Pisanica, sinjoro VAN DER HOEVEN opinias, ke la verda afero marŝos antaŭen kune kun la atingo de malfermita tuta Eŭropo, nome kiam la etoso de glasnosto regos ĉie kaj kiam la spirito de unuflankeco estos for.

Cl.- Laŭ la opinio de sinjorino Mila VAN DER HORST-KOLINSKA en Den Haag, informado estas la piej grava tasko de radio kaj revuoj. Tamen laŭ ŝiaj observoj tiu informado daŭre lamas. Revuoj aperas tro malfrue kaj radiaj elsendoj estas ofte ne kompletaj. Kvankam sinjorino VAN DER HORST trovas majn elsendojn variaj, aktualaj kaj interesaj, al ŝi persone tamen mankas en la disaŭdigoj la regula prezento de korespondletoj. Ŝi opinias, ke jare nur unufoja prezentado de la skribaĵoj donas la impreson, ke aŭ ni ne ricevas sufiĉe da leteroj, aŭ la enhavo de ili estas neinteresaj. Iom da statistiko estus do interesa por la aŭskultantoj. Ni povas respondi, ke sinjorino VAN DER HORST estas tute prava. Ni atribuas grandan atenton al la ricevitaj korespondaĵoj kaj tute intencas lanĉi regulajn prezentadojn por daŭre resti en kontakto kun niaj geaŭdantoj. Estonte ni klopodas respekti la neceson de aktuala informfluo. Krome ni atentigas, ke en la nova prospekto estas publikigitaj statistikaj ciferoj pri la korespondaĵoj. Ni povas ĝoje konstati, ke ili estas daŭre kreskantaj. Ni esperas, ke tio restos ankaŭ post la ŝanĝo de la poreŭropa elsendohoro, kiun kritikis multaj radio-amikoj.

A.- Skribis al ni multaj aliaj esperantistoj el Nederlando, kaj ni esperas, ke ni povos citi el iliaj leteroj alian fojon. Ĉiukaze koran dankon pro via intereso.

Cl.- Ankoraŭ unu leterkesto-rubriko atendos vin venontsabate. Ĝis tiam Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI diras al vi ĝis reaŭdo!